

# 1910

Interaga, multimedia teatraĵo

**Ĵenja Amis**

*kun gravaj kontribuoj de Garry Evans, Alena Adler kaj Brandon Sowers*

Prezentita vive kun granda sukceso dum la Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo (aŭgusto 2022). La filmo de la premiero de "1910" en Montrealo, fare de Alekso Miller, estas havebla en lia jutuba kanalo "Exploring Esperanto":

[youtube.com/@ExploringEsperanto](https://youtube.com/@ExploringEsperanto). Rekta ligilo al la filmo: [mallonge.net/1910](https://mallonge.net/1910)



## Rolantoj

- S-ro Mann: atleta, junece aspekta viro, 30-40-jara
- Mary: eleganta virino, 30-40-jara
- La publiko (“la publiko”): 5-15 personoj, kiuj starigas demandojn al s-ro Mann

*S-ro Mann estas vigla juneca viro, kun afabla vizaĝo kaj inteligentaj okuloj. Li parolas sincere, senartifike kaj modeste, kun ĉarma, tre leĝera brita akĉento. Li promenas rapide, elegante kaj kvazaŭ senpeze. Li surhavas kravaton, blankan ĉemizon, ideale gladitan kostumon kun blanka naztuko en la poŝeto de la jako. Sub la jako videblas veŝto kun horloĝa ĉeno. S-ro Mann portas klasikajn rondajn okulvitrojn. Li respondas la demandojn kaj energie dialogas kun la publiko. Li aspektas kvazaŭ li havas tiom da aferoj por rakonti, ke lia “taso superfluas”. S-ro Mann komprenas, ke li ne plu estas en la tempo de Zamenhof, sed en jarcento poste, sed li tamen referencas al 1910 kiel la nuno. Tio neniel zorgigas lin.*

*S-ro Mann parolas en la maniero, en kiu oni parolis en la tempo de Zamenhof: ekzemple, li nomas Universalan Kongreson “Internacia Kongreso”, la jidan lingvon “la hebrea lingvo” kaj simile. Li ankaŭ uzas kelkajn vortojn, kiujn oni konsideras arĥaikaj en la 21-a jarcento: ekzemple, “emigracia” anstataŭ “enmigra”, “Ameriko” anstataŭ “Usono” ktp.*

## Akto 0, Sceno 0. Bonvenigo de s-ro Mann

*Sur la scenejo staras klasika ligna tablo, kovrita per tablotuko, kun klasika ligna seĝo apud ĝi. Sur la tablo estas glaso da akvo. Pli profunde en la scenejo estas lito, kovrita per kovrilo. Sub kovrilo estas kelkaj kusenoj, kiuj povas aspekti kiel homo, kuŝanta en la lito. Ĝis la lasta sceno, la lito troviĝas ekster la lumo kaj estas preskaŭ nerimarkebla.*

*La anoncanto eniras sur la scenejon por prezenti la honoran gaston: s-ron Mann. La bonvenigon oni povas libere alĝustigi al la cirkonstancoj / evento / loko, dum kiu oni prezentas la teatraĵon. La enkondukanto(j) uzu sian propran nomon, sed oni rajtas, se oni volas, ankaŭ reprodukti la ekzaktan enkondukon, kiel ĉi-sube, uzitan dum la Montreala Universala Kongreso en 2022.*

### Enkondukanto

Saluton al ĉiuj. Bonan vesperon! Mi estas Nicolas Viau, vicprezidanto de la loka kongresa komitato de tiu ĉi kongreso. Ĉu vi ŝatas ĝin ĝis nun? Imagu, ke ĝi estas nur la dua Universala Kongreso, kiu fakte okazis en orienta Nord-Ameriko. La unua Universala Kongreso kiu okazis en tiu ĉi mondoparto estis tiu de Vaŝingtono en 1910. Kaj hodiaŭ, ĉi-vespere, mi kun plezuro bonvenigas s-ron Mann, el Britio, kiu rakontos al ni pri tiu grava evento: La Sesa Internacia Kongreso de Esperanto. Li ankaŭ rakontos al ni pri sia vojaĝo kun Ludoviko Zamenhof al nia kara urbo, Montrealo. Aplaudu por bonvenigi sinjoron Mann!

*(Post la bonvenigo, la enkondukanto foriras el la scenejo)*

## **Akto 1, Sceno 1. Zamenhofen!**

*Komenciĝas la unua muzika peco de la teatraĵo (en Montrealo: "Maple Leaf Rag"). S-ro Mann komence estas en la la malantaŭo de la teatro. Kun la eko de la muziko, li ekiras direkte al la scenejo. Li promenas senhaste, sed tamen sufiĉe rapide. Dumvoje, li salutas homojn, levante la ĉapon, kaj improvize dialogas kun la ĉeestantoj. Li demandas, ekzemple, de kie oni venas, ĉu oni bone fartas, ĉu bone vojaĝis, ĉu oni ĝuas la vesperon, ktp. Li supreniras al la scenejo. Kiam s-ro Mann estas jam sur scenejo, la muziko iom post iom mallaŭtiĝas.*

**S-ro Mann** *(de la scenejo):*

Saluton, saluton, saluton!

Ho, mi ĝojas vidi vin! Kaj tiom multnombraj! Mi estis tiom feliĉa, kiam mi ricevis la inviton veni ĉi tien! Mi tiom antaŭĝojas rakonti al vi pri la vojaĝo kun la Majstro kaj Sinjorino Zamenhof al Ameriko en 1910!

*(La muziko ĉesas; s-ro Mann malaltigas la voĉon kaj parolas al la homoj pli intime)*

Mi havas konfeson. Mi absolute adoras Sinjoron kaj Sinjorinon Zamenhof! Mia koro tiom bategis, kiam alvenis la letero de la Majstro kun la enkonduko al mia modesta libro: "Esperanto Self-Taught with Phonetic Pronunciation"! *(Sur la ekrano estas la foton de la libro. S-ro Mann elprenas el la poŝo de la jako zorge falditan leteron)* Mi ĉiam portas la leteron kun mi! Jen ĝi! Bele, ĉu ne?

*(S-ro Mann aspektas ke li subite memoris ion).* Ho ve! Eble ne ĉiuj ĉi tie konas min! Mi tute forgesis prezenti min! Pardonu min. William Mann, el Britujo, je via servo! Mi iom verkas, tradukas, redaktas, kiel eble multaj el vi ĉi tie! *(S-ro Mann diras kvazaŭ*

*pardonpetante*) Mi esperas, ke vi estas ne tro ĉagrenitaj, ke estas nur mi, kaj neniu famulo, kiu parolos kun vi hodiaŭ... Sed bone, sufiĉas tedi vin! Mi ja venis por paroli tute ne pri mi, sed pri la homo vere granda. Pri Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj la vojaĝo al la mirinda Sesa Internacia Kongreso de Esperanto en Ameriko!

*(La publiko, ĉiuj samtempe kaj senorde, ekstaras kaj elkrias demandojn. Oni ne povas aŭdi tiujn demandojn, ĉar la publiko krias unu super la alia)*

- Ĉu vi bone vojaĝis?
- Ĉu la Kongreso estis sukcesego?
- Ĉu vi marmalsaniĝis?
- Kiom longe daŭris la ŝipa vojaĝo?
- Kion vi opinias pri Ameriko?
- Kiujn urbojn vi vizitis?
- Ĉu vi vizitis Kanadon?
- Ĉu loĝas parencoj de Zamenhof en Ameriko?

*(Aiaj demandoj povas veni spontane; s-ro Mann aspektas tute supersutita de la demandoj)*

### **S-ro Mann:**

Ho, ne-ne-ne, ne ĉiuj samtempe, mi petas! Mi promesas, ke mi respondos al ĉiuj viaj demandoj. *(s-ro Mann levas kaj montras sian taglibron)* Do jen mia taglibro, mia trezoro. Tie mi notis preskaŭ ĉiun horon de mia vojaĝo al Ameriko. Sidiĝu komforte, amikoj, kaj mi legos al vi pri la komenco de mia vojaĝo.

*(S-ro Mann eklegas el la taglibro)*

“Mi tute ne povis dormi la antaŭan nokton pro la ekscitiĝo. Baldaŭ mi vidos la Majstron! Ni multe ridis en la trajno de Londono, kaj la aliuloj scivoleme rigardis nin. Kiuj estas tiuj homoj kun verdaj steloj kaj la flago? Jen ni elvagoniĝis kaj eniras la ŝipeton, kiu portos nin ĝis la granda trans-oceana ŝipego, tro granda por eniri en la havenon. Nur kelketaj el ni fakte vojaĝos sur tiu ŝipo kun la majstro. La aliaj samideanoj venis nur por premi la manon de la majstro kaj forsaluti lin al Ameriko. Mi preskaŭ povas aŭdi la batadon de

niaj koroj. *(S-ro Mann batas la manon kontraŭ la koro)* Bum! Bum! Bum! Kaj fine ni vidis la gigantan ŝipon impone leviĝi el la akvo. *(sur la ekrano aperas bildo de la ŝipo "George Washington")* Kontraste kun ĝi, nia eta ŝipeto aspektis, kiel infana ludilo. *(S-ro Mann metas manojn kiel laŭtparolilo)* Jen li! La majstro! Ho mia kor'! Ĉu ĉio ĉi estas vera? Mi povis vidi lin, lian vizaĝon, eĉ de malproksime. Oni salutas nin de la ŝipego per la kantado de "La Espero." Ho, kia bonvenigo!

Mi plej bone memoras la momenton de disiĝo kun samideanoj, kiuj venis por forsaluti la gemajstrojn. Ja la tempo kaj la tajdo neniun atendas... La senkompata sonorado, kiu anoncas, ke la nepasaĝeroj devas nun forlasi. Ili malĝoje reiras al la ŝipeto, kiu veturigos ilin reen al Southampton. Sed ili regajiĝas, kiam ni ekkantas la Esperon. Ili respondas kantante. *(La piano milde ludas "La Esperon"; sur la ekrano ekruĝas la bildoj de la ŝipo; s-ro Mann parolas samtempe kun muziko.)* Tiu bildo ĉiam restos antaŭ miaj okuloj. Jen ni, sur la giganta ŝipego, kiu iras al Ameriko, kaj jen niaj amikoj, kiuj venis ĝisrevidi nin, sur la eta servo-ŝipeto. Ĝi iom post iom malproksimiĝas. Baldaŭ ni ne plu povis aŭdi aŭ vidi la samideanojn. Sed ni ankoraŭ longe adiaŭas unu la alian per manoj kaj tukoj..."

*(S-ro Mann por kelkaj momentoj fariĝas pensema kaj kortuŝita; la muziko mallaŭtiĝas kaj haltas post la unua strofo; sur la ekrano estas bildo kun la ŝipo. S-ro Mann montras al la foto de la ŝipo sur la ekrano)*

Jen, amikoj, nia ŝipo! La giganta "George Washington"! Ĉu vi vidis ion pli belan?

## Akto 1, Sceno 2. Surŝipe

*(La lumbildo de la ŝipo restas sur la ekrano la tuta unua periodo de demandoj-respondoj).*

**S-ro Mann rigardas al la publiko:**

Ĉu vi eble havas demandon?

**La publiko:**

Kiom granda, fakte, estis la ŝipo?

**S-ro Mann:**

Ĝi estis grandega. La tria plej granda en la mondo, mi pensas. Kaj ni estis sufiĉe multnombraj por mem formi urbeton de preskaŭ tri mil homoj. Kaj la vojaĝantoj estis divers-specaj, kvazaŭ la tuta mikroverso de la homaro. Kaj por mil elmigrantoj tiu ŝipo estis la portilo al nova vivo en la nova mondo, en Ameriko.

**La publiko:**

Ĉu la longa vojaĝo ne estis tro teda?

**S-ro Mann:**

Ankaŭ mi antaŭe pensis, ke la maro estas teda, sed ĝi tute ne estas. Ĝi ĉiam ŝanĝiĝas, ĉu ne?

Mi tiom ĝuis sidi sur la supra ferdeko kaj vidi la ondojn danci ĉirkaŭ mi. Nur en la unuaj du tagoj

mi sentis iom da neagraba ĝeno kaj pezeco. Sed poste mi povis ĝui la bonegan freŝan mar-aeron en plena ĝojo. Kaj ni ankaŭ bone amuziĝis! La ŝipa orkestro ludis por ni ĉiun vesperon en diversaj partoj de la ŝipo. Fakte, estis la kelneroj kaj kuiristoj, kiuj servis nin dum la tago, kaj kiuj ankaŭ ludis por ni vespere. Kiam mi pensas pri tio nun, eble, ili estis ege lacaj post tiu vojaĝo! Aliaj demandoj?

**La publiko:**

Ĉu la manĝaĵoj estis bonaj?

**S-ro Mann:**

Interesa demando. Ili estis bonaj (*s-ro Mann paŭzas por momenteto*)... almenaŭ por ne-vegetaranoj. Mi mem sufiĉe spertiĝis pri plukado kaj kombinado de vegetaranoj manĝaĵoj el la ne-vegetarana menuo. Mi certas, ke en via tempo, la vivo por vegetaranoj estas multe pli facila ol ĝi estis por mi en mia tempo. Sekva demando?

**La publiko:**

Ĉu vi propagandis surŝipe?

**S-ro Mann:**

Ho, jes, absolute, ni propagandis! Fakte, mi tuj komprenis, ke ŝipo estas la perfekta propagandejo, ĉar ne eblas iri ekstere! (*s-ro Mann ridas*) Sed serioze... Ni faris

paroladojn germane kaj angle por la pasaĝeroj de la unua kaj dua klasoj. Fakte, la ŝipo ankaŭ havis sian propran presejon. Kaj ni metis specialajn propagandajn anoncojn en la ĉiutaga ŝipa gazeto. *(s-ro Mann prenas de la tablo la folion kun la ŝipa menuo kaj montras ĝin al la publiko)*. Tuj, ĉi tie, tuj apud la tagmanĝa menuo! Do neniuj ŝanco, ke oni maltrafu ĝin, ĉu ne? En la libroservo ni elmetis Esperantajn lernolibrojn kaj, jes, kompreneble, ni organizis ĉiutagan kurson de Esperanto. Do mi povas garantii al vi, ke restis eĉ ne unu persono sur tiu ŝipo, kiu ne aŭdis pri Esperanto. Kaj ne forgesu la Zamenhofan tablon en la manĝo-salono kun la Esperantaj flagoj, verdaj rubandoj kaj tiel plu. Do se vi permesos, mi denove legos al vi el mia taglibro.

*(Sur la ekfano estas pliaj fotoj de la ŝipo, kaj s-ro Mann plue legas el la taglibro)*

“Mi antaŭe pensis, ke la reklamaj broŝuroj troigas pri la komforto sur la transatlantikaj ŝipoj,

sed tute ne. Estas tute facile forgesi, ke ĉie ĉirkaŭ vi estas vastega oceano. Aparte kiam vi sidas en luksega salono en la unua klaso, kaj aŭskultas muzikon de iu virtuozo, kiun por vi fidele reproduktas elektra piano. Por ni verkemuloj, troviĝas sur la ŝipo eĉ speciala ĉambreto, kie vi povas senpage uzi skribmaŝinon. Sur la supra ferdeko por la pasaĝeroj de la unua klaso

estis gimnastikejo kun plej modernaj elektraj ekzerciloj kaj eĉ elektraj masaĝiloj, kiuj frapetas aŭ frapegas vin laŭ via plaĉo. Mi pensas, ke la ŝipa vivo estas por mi pli komforta, ol la vivo en mia londona apartamento! Plej impresis min la kuirejo, kun siaj miloj da vazoj kaj zorge dismetitaj fakoj, en tiom eta spaco! Estas kvazaŭ ili perfekte eluzis ĉiun haveblan centimetron. Poste mi iris suben al la loko, kie oni konservadas la manĝaĵojn freŝaj dum la tuta vojaĝo. Tra dikega kvazaŭ-kofra pordo mi penetris en glacian temperaturon. Tie ni vidis grandajn viandopecojn pendantajn de la plafono. Mi devas konfesi, ke tiu vizito ja multe vundis miajn vegetaranajn okulojn kaj nazon, sed min revivigis la fruktejo! Nia vojaĝo finiĝis en la tria klaso, ĉar en la kvaran klason pro emigraciaj leĝoj, oni ne permesas aliklasanojn eniri.”

*(S-ro Mann ĉesas legi; li paŭzas iom, rigardas al la publiko kaj parolas kun ioma nostalgio)*

La naŭ tagoj de la vojaĝo pasis tiom rapide! Mi devas diri al vi, amikoj, ke kiam ni atingis Novjorkon, mi sentis eĉ iom da sopiro al la bela ŝipa rutino kaj la mara vivo.

# Akto 1, Sceno 3. La urbo, kiu neniam dormas

*(Oni ekludas muzikon: "The Sidewalks of New York". Sur la ekrano estas bildoj pri Novjorko. Post kelkaj momentoj de nur muziko kaj bildoj, S-ro Mann daŭrigas la legadon el la taglibro, akompanate de la muziko).*

"Kaj jen, ni alvenas. Kiam ni elŝipiĝis, mi kvazaŭ sentis, ke eĉ aero novjorka estas pli pura, pli freŝa, pli libera, pli magia... kaj ho... la gigantaj ĉiel-skrapuloj! Estas la unua afero, kiun vi vidas de la ŝipo. Kompare kun ili, eĉ la Statuo de Libereco en la novjorka haveno aspektas iel negranda kaj senpotenca (*muziko haltas*). Sur la kajo renkonis nin la bofrato de la Majstro, sinjoro Silbernik. Li helpis al ni deklari niajn valizojn kaj trakti kun la senkompataj doganistoj". (*S-ro Mann rigardas al la publiko kaj diras indigne*) Imagu, ili provis pagi nin sep dolarojn por importi nian Esperantan flagon!

Do ĉu vi havas demandon pri la vizito al Novjorko?

**La publiko:**

Ĉu estis malfacile orientiĝi en Novjorko?

**S-ro Mann:**

Jes, fakte, mi havas amuzan rakonton pri tio. Amuzan nun, sed ne tiam! Ni preskaŭ perdis nian kongresan sekretarion. Tuj kiam ni eliris el la ŝipo en Novjorko, atakis nin tuta armeo de diversaj transportistoj. Kelkaj el ili eĉ provis perforte preni niajn pakaĵojn kaj sidigi nin en siajn veturilojn! (*s-ro Mann forpuŝas la imagitajn transportistojn*) Ne, dankon. Ne, dankon! NE, DANKON! Sed imagu, kio okazis, kiam ni provis kuniri trame. La kongresa sekretario -- estis s-ro Chavet -- eniris la tramon la unua, kaj (*s-ro Mann imitas la traman sono*) BRUN! BRUN! Ĝi ekis antaŭ ol la ceteraj el ni povis eniri! Ni vidis lian konsternitan vizaĝon pli kaj pli malproksimiĝi. Kaj por aldoni al nia amaro, la sekva tramo estis plenplena kaj ne akceptis pasaĝerojn! Ni finfine sukcese salti en unu tramon. Kvin minutojn poste, ni vidis lin kuri post ni! Ni vere estis feliĉaj kiam ni povis rekuniĝi je la sekva halto.

**La publiko:**

Ĉu vi supreniris al unu el la ĉiel-skrapuloj de Novjorko?

*(sur la ekrano: bildoj de ĉiel-skrapuloj)*



**S-ro Mann:**

Ha jes, pri ĉielskrapuloj! Unu tagon ni supreniris sur la turegon Singer. Ho, kia vido! La tuta urbo sternaĝas tie antaŭ viaj okuloj, kun la senĉese moviĝanta procesio de hometoj, aŭtoj, kaleŝoj, luksaj mondfamaj magazenegoj kaj la ĉefsidejoj de grandaj korporacioj.

**La publiko:**

Ĉu vere Novjorko estas la urbo, kiu neniam dormas?

*(sur la ekrano: bildoj de nokta Novjorko)*

**S-ro Mann:**

Jes, certe! Ni loĝis en Manhatano, tuj apud la strato Broadway. Vi ne povas imagi, kiom luma ĝi estas! La nokto estas, kiel tago. Vere, estas Novjorko, kiu meritas la titolon de la Urbo de Lumoj eĉ pli ol Parizo. Estas kvazaŭ tiu lumo kaptas vin en sian sorĉon. Ĉu vi scias, ke en Novjorko oni eĉ parolas pli rapide? Kvazaŭ tiu energio, kiu lumigas la brilantajn lumafiŝojn, iel magie transdoniĝas ankaŭ al vi!

**La publiko:**

Ĉu estas vero, ke Novjorko estas riĉa kaj luksa?

**S-ro Mann:**

Ha, bona demando! Ankaŭ mi ofte pensis pri tio. Estas kvazaŭ Novjorko havas du vizaĝojn. La novan, riĉan fasadon kaj la malriĉecon malantaŭ tiu fasado. Ni spertis tion, kiam ni vojaĝis plurajn fojojn kaj tra la riĉa okcidenta parto, kaj tra la malriĉa orienta. Do mi denove legos por vi pri tio el mia taglibro.

*(S-ro Mann legas el la taglibro; sur la ekrano: la bildoj de Novjorko)*

“Hodiaŭ ni veturis sur jaĥto laŭ la riverbordo. Antaŭ ni leviĝis longaj vicoj de mult-etaĝaj apartamentejoj kun belstilaj fasadoj. Mi ankoraŭ neniam vidis tiom da lukseco. Lui unu apartamenton laŭ la riverbordo kostas mil dolarojn jare! Nekredeble, ĉu ne? Sed, se vi pensas, ke la tuta Novjorko estas luksa kaj riĉa, vi tute eraras. Sinjoro Silbernik, la bofrato de la Majstro, afable invitis nin al tiu vizito. Li volis doni al ni la plenan bildon de la urbo. La orienta kvartalo estas vera malriĉulejo.

Tie loĝas la fremdula parto de la urbo. Kia svarmejo! Kiel pitoreskaj estas la stratoj kun siaj etaj budaj vendejoj, siaj butikoj kun la kuriozaj surskriboj en la hebrea lingvo. La

infanoj, kiuj en ĉiaj gradoj de vesta neglekto, ludas kaj baraktas sur la strato. La popolamaso estis tiel densa,

ke ni devis veturi laŭ piedira malrapideco. Ĉiun duan metron nia aŭtomobilo profundigis

duonfuton en ian truon aŭ devis eviti ian amason da rubaĵoj. Por la momento vi pensas, ke vi estas en malriĉa Suda Eŭropo kaj tute ne en la riĉa Ameriko! Sed malgraŭ la ĝenerala nelukseco, ni vidis multajn bonhumorajn vizaĝojn, kaj certe ne mankis tie gajeco kaj vivoĝojo”.

*(S-ro Mann ĉesas legi kaj rigardas la publikon)*

Sed bone. Eble mi tro filozofumas! Ja restas al mi rakonti por vi pri la kongreso mem!

## **Akto 2, Sceno 1. Zamenhof Alvenas!**

*(Oni ekludas muzikon: “La Espero”; unu strofo; post iom da tempo de nur muziko, s-ro Mann komencas plulegi el la taglibro, akompanate de la muziko; la muziko iom post iom mallaŭtiĝas kaj fine ĉesas)*

“Ni elvagoniĝis en la tre bela stacidomo Union Station iom post la kvara posttagmeze en sabato. Tie jam kolektiĝis granda amaso por bonvenigi nin. *(S-ro Mann imitas laŭtajn kriojn de salutantoj)* Vivu Zamenhof! Vivu Esperanto! Ĉiuj viroj svingis la ĉapelojn, kaj virinoj la tukojn! *(s-ro Mann elprenas el la poŝo de sia jako naztukon kaj eksvingas ĝin; poste li metas ĝin sur la tablon).*

Inter la venintoj estis eĉ kvar policanoj. Jes! Kvar membroj de la Vaŝingtona polico ellernis Esperanton speciale por pli bone servi por ni dum la kongreso! Ili helpis al la kongresanoj aranĝi sin kaj formi irejon de du longaj vicoj de salutantoj. Tra tiu irejo, kvazaŭ tra triumfa vojo, paŝis, modestulo, kiel ĉiam, la Majstro.”

*(s-ro Mann demetas la taglibron sur la tablon).*

Do, ĉu vi havas demandojn pri la kongreso?

**La publiko:**

Ĉu gazetaroj interesiĝis pri Esperanto?

**S-ro Mann:**

Ha jes. Bona demando. Jes, absolute! *(s-ro Mann iom ridas)* Ne ridu, mi petas, sed unu el miaj neoficialaj taskoj estis plenumi la rolon de korpogardisto de Doktoro Zamenhof kontraŭ tro fervoraj raportistoj *(s-ro Mann ŝajnigas forpuŝi amasojn da imagitaj raportistoj)*. La majstro devis regule submetiĝi al diversaj intervjuoj, kaj amaso da ĵurnalistoj ĉeestis ĉiujn gravajn eventojn. Fakte eĉ la ĉefa urba gazeto anoncis la alvenon de la majstro per la vortoj en Esperanto sur la unua paĝo: Zamenhof Alvenas! *(sur la ekrano estas la bildo: "Zamenhof alvenas" el Washingto Star)*

**La publiko:**

Kiaj do estis Sinjoro kaj Sinjorino Zamenhof?

**S-ro Mann:**

Ili estas modestaj. Ege modestaj. Ambaŭ malŝatas supraĵajn paroladojn. Kaj la majstro ofte sidis silenta ĉe la manĝotablo sur la ŝipo, ofte leganta aŭ skribanta. En la unua vespero en Vaŝingtono okazis nesolena akcepto. Kaj, kompreneble, ĉiuj kongresanoj estis avidaj premi la manon de la majstro kaj interkonatiĝi. La majstro ŝajne sufiĉe al kutimiĝis al tiaj aferoj kaj lin tute ne timigis la vicego de man-premantoj. Sinjorino Zamenhof tamen ne kuraĝis submetiĝi al tiu taskego. Ŝi modeste intermiksiĝis kun la samideanoj kaj amike babilis kun ili.

**La publiko:**

Ĉu plaĉis al vi Vaŝingtono?

**S-ro Mann:**

Jes. Ĝi plej impresis min. Kaj fakte multe ŝanĝis mian unuan vidon pri Usono. Ĝi vere estas la urbo inda de la granda lando, kiun ĝi reprezentas. *(Sur la ekrano ruliĝas la bildoj de Vaŝingtono)* Kaj fakte, aparte impresis min la biblioteko de la kongreso. Ne de nia kongreso, kompreneble, la biblioteko de LA kongreso. Ĝi havas spacon por kvin milionoj da libroj! Nekredeble, ĉu ne? Do mi denove legos por vi el mia taglibro pri niaj vizitoj en Vaŝingtono.

*(s-ro Mann legas el la taglibro):*

"Preskaŭ la tutan dimanĉon niaj samideanoj fervore dediĉis sin al la plej agrabla tasko: esplori la urbon, perpiede, per la tramoj kaj aŭtomobiloj. Unu kompanio de turistaj aŭtomobiloj eĉ publikigis reklam-folion en Esperanto pri ĉiuj urbaj vidindaĵoj. Ili eĉ

rezervis por ni dum la tuta semajno specialan ĉaron. En tiu ĉaro veturis kun ni Esperanto-gvidisto, kiu plej lerte priblekis per megafono ĉiun interesaĵon.” (s-ro Mann rigardas al la publiko) Miaj amikoj en Ameriko eble devas pardoni min, sed amuzis min la kutimo de gvidistoj en Usono aldoni al ĉiuj rimarkoj, ke tiuj aŭ jen aŭ estas (s-ro Mann diras kun forta usona akĉento) ‘La plej granda en la mondo!’ aŭ ‘Ĝi kostis tiom da milionoj da dolaroj!’”

**\*\*\*\*fino de la parto disponigita por la legado; la libro “1910” aperos en 2025 en la printa formo\*\*\*\***